

JAM KOMENCIĜAS LA 72a HISPANA KONGRESO

Tuj post la eldono de tiu ĉi bulteno komenciĝos en Zaragozo la 72-a Hispana Kongreso, kiu disvolviĝos inter la 3-a kaj 5-a de majo.

Ĝi estas organizata de "FRATECO", la Aragona Esperantista Asocio, en kunlaboro kun Hispana Esperanto-Federacio. "Lingvo kaj sento", jen la kongresa devizo. La kongreso havos kiel bazan mot(iv)on la difinon esprimatan de K. Kalocsay por karakterizi nian idiomon: "Lingvo kaj sento. Jen estas Esperanto".

La baza sidejo de la kongreso estos salono en hotelo (nome: Hotel Goya), kies adreso situas en strato 5 de marzo, je la centro de la urbo (apud: placo de España kaj avenuo Independencia). La muzikaj programeroj disvolviĝos en proksimaj lokoj. Krome, oni povos same disponi de la propra sidejo de la asocio kiu situas en strato Cadena, 20, 1a.

Eblas ankoraŭ aliĝi, kaj plenumi la administrajn taskojn surloke. Por tio kaj por plia informado, eblas kontakti kun "FRATECO" ĉe la adreso fratecoesperanto@yahoo.es.

La informoj, kune kun la tuta Kongreslibro, estas konsultebla en la retejo de la aragona grupo ĉe la adreso: <http://sites.google.com/site/zaragozafrateco>.

Je la 25-a de aprilo de 2013 aliĝis oficiale jam 85 personoj, el kiuj 9 venas el Madrida Regiono.

PROGRAMO DE LA 72-A HEK

VENDREDE (3-a de majo)

10:30 - NeSolena malfermo de la Kongreso.

11:00 - Prelego de Antonio Marco: "Komentoj pri Donkiĥoto kaj ĝia tradukinto". Omaĝo al Fernando de Diego. Donacado de ekzemplero al ĉiu kongresano.

12:30 - Interkona mateno.

16:30 - Vizito al Aljafería

19:00 - Muzika prelego de Eduardo Berdor: "La valsoj de Chopin, romantika ĉefverko".

21:00 - Muzika spektaklo de SoloTronik: "Elektronika Flamenko" ("Sala El Zorro". Komercocentro "El Caracol". Adreso: Paseo Independencia, 24, local 79)

SABATE (4-a de majo)

10:30 - Solena malfermo de la Kongreso

11:30 - Prelego de Miguel Fernández: "Poezio: armilo ŝargita per futuro. Esperanta antologio de

hispana poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia".

13:00 - Prezento de ludkartaro de Abel Montagut: Ludkartoj de "Talismanoj" (3-a serio) pri "Mil kaj unu noktoj" kaj "Al-Andalus".

14:00 - Oficiala bankedo

17:30 - Prelego/ateliero de Jorge Camacho: "Esperanto kaj poezio".

18:45 - Prelego de Antonio Valén: "Kalmo kaj malkalmo en Kálmán Kalocsay".

20:00 - Muzika prezentado de JoMo ("Sala Creedence". Adreso: Placo San Lamberto, 3)

DIMANĈE (5-a de majo)

10:30 - Prelego de Antonio Marco: "La poezi-difino".

11:30 - Esperanto-Instruado. Ĉu ILEI en Hispanio?

12:00 - Ĝenerala Kunveno de HEF.

13:30 - Oficiala fermo.

La oficiala fermo de la Kongreso okazos dimanĉe tagmeze. Tamen, vespere eblos profiti por fari promenadon tra la urbo kaj viziti kelkajn lokojn laŭ intereso de la partoprenantoj.

En la Kongreso funkcios Libroservo kaj eblos spektado de filmetoj kun subtekstoj en Esperanto.



SAT-KONGRESO

Ankaŭ marŝas sufiĉe flue la organizado de la 86a kongreso de SAT, kiu kiel anoncote okazos de 28a de julio ĝis 4a de aŭgusto 2013 en Madrido, nome ĉe Colegio Mayor San Juan Evangelista.

Vidu nian pasintan numeron por scii pri la programo kaj la ĉefaj trajtoj de la organizado.

Vizitu ankaŭ la oficialan retejon <http://satesperanto.org/-2013-86-madrido.html> por pluaj detaloj.

LEGADO DE QUIJOTE EN CÍRCULO DE BELLAS ARTES

Kiel tradicie, dum la tagoj ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Libro, en la madrida kulturcentro Círculo de Bellas Artes oni laŭtlegis sinsekve la tutan verkon Donkiĥoto, de Cervantes.

Kaj ankaŭ kiel jam tradicie, tie enestis peco en Esperanto. La 23-an de aprilo, ĉirkaŭ la 5-a vespere, Toño del Barrio kaj Miguel Fernández legis kelkajn paragrafojn el la komenco de la dua parto.

La legadon eblis sekvi pere de la reto, ene de la retejo de la Círculo.

LASTE APERIS

En la profundo. Jorge Camacho. Poezio originala, Mondial, Novjorko, 2013, 319 paĝoj. Prezo: 18,00 €

La plejparto de la poemoj en la profundo de tiu ĉi nova poemaro venas el 2012. Al ili aldoniĝas iom da restaĵoj el 2009 kaj 2011 kaj kelkaj freŝaĵoj el 2013.

Pliajn detalojn: <http://katalogo.uea.org/index.php?inf=8925>

**VIZITOS NI**

Carmen Suárez kaj Lupe Sanz faros piede la Jakoban Vojon. La 9an de majo ili foriros el Roncesvalles kaj intencos atingi Santiagon post 4 semajnoj.

Ili petas al esperantistoj kiuj loĝas proksime al la Vojo kontakti ilin por ebla interkonsento (skribu al la adresoj de Liceo se vi ne konas ilian adreson)

HELPO AL ORFEJO DE KONGO

Memoru ke nia samideano Pedro Hernández peras helpkontribuojn por orfejo en urbo Goma, Kongolando, estrata de esperantistoj. Kontribuu al la konto ĉe Triodos Bank: 1491 0001 22 2042949723.

VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

Pro la okazigo de la Hispana Kongreso, la ĉimonata sabata babilrondo ne okazos la unuan semajnfino. Vizitu la retlistojn por scii pri lastminutaj detaloj.

Tiaj novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده/, aŭ en retejo <http://www.esperanto.es/mel>.

Profitu la renkontojn por aliĝi al MEL kaj apogi la poresperantan agadon.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

